

# LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-  
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE  
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.) och Norvega Esperantista Ligo (N. E. L.)

Redaktör — redaktoro: **R. PEHRSSON**, 3—23,  
Gävle, (Svedujo).

Ansvarig utgivare — responsa eldonanto kaj  
administranto: **W. WAHLUND**, Gävle, (Svedujo).

N:o 6.  
Juni 1915.

Prenumerationspris — abonprezo: i Sverige  
1: 20 kr., i Norge 1: 60 kr., eksterlande 1: — Sm.  
(1: 82 kr.).  
Lösnummer 10 öre.  
Annonpris — anonprezo: 5 öre per mm.

## La Esperanto-tago en Norrköping.

La nunjara Esperanto-tago, la kvina en la vico, okazis la 11—13 de junio en Norrköping, kie la loka klubo, »La Esperanta Stelo» kun laŭdinda zorgo kaj akurateco faris la aranĝojn. Bedaŭrinde iliaj aranĝoj ne estis rekompencitaj per tiel granda nombro de partoprenantoj, kiel oni povus atendi. La sciigo pri la ŝanĝita kongresloko evidente venis tute tro malfrue al multaj, kiuj ne povis havigi al si tiel baldaŭ la bezonatan libertempon.

La kongreso estis malfermata en la vendredo vespere per agrabla festo en la ejo de la kongreso, la ĉambroj de la »virina kontorista societo,» antaŭ kiu la esperanta standardo gaje flirtante salutis la gastojn. La prezidanto de »La Esperanta Stelo», s-ro Leander Tell, en elokventa parolado salutis la gastojn bonvenintaj, post kiam kune estis kantata la himno, »La Espero». Post tio sekvis alternante muziko, »tesupeo,» teatroludo — prezentado de malgranda propaganda teatraĵo, nomita »Aventuro en Budapeŝt», kiu estis verkita de s-ro Tell kaj bazita sur simila okazaĵo, travivita de li dum lia vojaĝo pasintan someron. Entute la festo estis granda sukceso por la samideanoj en Norrköping.

En la sabato la 12-an de junio la antaŭtagmezo estis dediĉata al la traktadoj de la jarkunveno de S. E. F. kaj oni sukcesis tradiskuti

la plej multajn el la gravaj demandoj starantaj sur la tagordo. (Rilate al la traktadoj vidu en alia loko referaton de ili) Post tio oni faris promenadon al Åbackarna kaj Himmelstadslund, kien la vojo parte iris laŭlonge la belaj bordoj de »Motala ström» kaj preter »Kneippen», la fama banejo. Ĉe »Himmelstadslund» oni havis okazon rigardi sub la gvidado de s-ro Tell la tre unikajn kaj altinteresantajn desegnaĵojn ĉizitajn en la rokoj tie antaŭ ĉirkaŭe du mil jaroj de vikingoj, kiuj tiamaniere skribis la la unuajn liniojn de la sveda historio.

Vespere je la 6-a h. estis propaganda festeno en la kongresejo, kie ankaŭ estis aranĝita ekspozicio de diversaj esperantajĵoj de ĉiuj partoj de la mondo kaj ĉiuj regionoj de homa vivo. Salutinte la gastojn, la prezidanto en brila, konvinka parolado klarigis la celon de la esperantomovado, ĝia historio, ĝia nuna stato kaj ĝiaj eblecoj. La impresa parolado estis rekompencata per fortaj aplaŭdoj. Post la parolado la interesatoj havis okazon rigardi la diversajn ekspoziciaĵojn, kiuj ankaŭ vekis intereson ĉe multaj. Dume oni faris aranĝojn por ludi novan teatraĵon kaj baldaŭ la publiko povis ĝui la ĝojajn scenojn de »Sub la verda standardo» praktika kaj amuza leciono pri esperanto. Kaj ĉiuj la aktoroj-amatoroj meritas laŭdon por la maniero en kiu ili faris siajn rolojn. Kaj kiam post iom da muzikado kaj babilado la festo finiĝis, la impresoj de la gastoj fariĝis ankoraŭ pli forta, ke la Norrköping-aj samideanoj komprenis aranĝi agrablajn festojn. La dimanĉo estis laborplena tago. Jam kvaronhoron antaŭ la 6-a — laŭ la

programo estus ankoraŭ pli frue — oni veturis per la motorboato »Jäntan» tra la haveno kaj la bela Bråviken al »Djurön». La ĉefa vidindaĵo sur tiu insulo, mem tre vidinda, estas la granda, moderna mueleja konstruaĵo tie. Dank al afable donita permeso la partoprenantoj povis fari sub la gvidado de la muelestro mem promenadon tra la tuta konstruaĵo de la fundo ĝis sur la tegmento, studante ĝian multon de praktikaj maŝinoj, veraj majstraĵoj de moderna industrio, kiuj ĉe la nefakuloj nur povis veki admiron kaj intereson. Post la vizito en la muelejo oni faris promenadon tra la insulo. Sed baldaŭ estis la tempo por reveturi kaj ree oni havis agrablan vojaĝon sur Bråviken. Post ĉirkaŭe unu horo oni estis en la urbo.

Je la 12-a h. tagmeze rekomencis la traktadoj de la jarkunveno kaj ili daŭris ĝis la 5-a h. vespere, kial proponita ekskurso al Aby, kiu okazus je la 2-a h. ne povis okazi.

Pli malfrue en la vespero oni kolektiĝis al lasta kunveno en la agrabla kunvenejo. Kaj tiu lasta fariĝis kiel la antaŭaj vera sukceso. El la programo ni citu prezentadon de ankoraŭ unu teatraĵo, »Aventuro en Japanujo», parolado pri Bellman kun deklamo de kelkaj el liaj versaĵoj kun tradukoj en esperanto, farita de s-ro Tell, kantado duope de »Gluntar», la famaj versaĵoj de Gunnar Wennerberg, ĉio akceptata kun viglaj aplaŭdoj. Sed proksimiĝis la fino. S-ro Tell en mallonga parolado dankis la partoprenantojn pro la montrita intereso, esprimante la esperon, ke la laboro de la kongreso portu bonan frukton. Responde s-ro Wahlund, Gävle, esprimis tut-



koran dankon al »La Esperanta Stelo» por la bonega maniero, en kiu ili aranĝis ĉion por la kongreso kaj por la afabla akcepto, kiun ili spertis en Norrköping. Fine oni unuigis en viglaj hurakrioj por nia lingvo kaj ĝia aŭtoro.

La Esperanto-tago en Norrköping estas nur memoro. Sed memorante la agrablajn tagojn pasigitajn tie mi pli kaj pli sentas la dankon kiun ni ŝuldas al niaj samideanoj en Norrköping. Kaj precipe do estu dankata la prezidantoj de la klubo, s-roj Tell kaj Östling, kiuj kun tia zorgo kaj lerteco aranĝis la kongreson.

*Rpn.*



## S. E. F.

### Årsmötets förhandlingar.

Svenska Esperanto-Förbundets årsmöte ägde rum i Norrköping den 12 och 13 juni i samband med Esperantodagen därstädes. Mötet, som tog sin början kl. 11 f. m. lördagen den 12 juni, utsåg till ordförande hr W. Wahlund, Gävle.

Sedan protokoll över föregående årsmöte uppläst och godkänts, avsändes enligt vedertaget bruk ett hälsningstelegram till d:r Zamenhof, vilket dock på grund av krigsförhållandena ej kunde sändas på Esperanto utan måste avfattas på tyska.

Härefter övergick man till de egentliga mötesförhandlingarna. Ett ganska stort antal frågor stodo på dagordningen, men de flesta erbjödo ingen större svårighet att behandla och besluten följde raskt på varandra. Början gjordes med det vid ett par föregående årsmöten bordlagda förslaget om anordnandet av en större föredragsresa om Esperanto genom anställande av en lämplig talare för en kortare tid. Detta förslag bordlades ånyo, men i stället uttalade sig mötet för att lokalföreningarna och enskilda esperantister var och en i sin stad och i omkringliggande platser anordnade föredrag om Esperanto och beslöt man att tillsätta en särskild »centralkommitté» för att organisera detta arbete, varjämte de skulle tillhandagå resp. talare med lämpligt materiel. Till kommitterade utsågos hrr Leander Tell, Norrköping, R. Pehrsson, Gävle, Carl Ohlsson, Göteborg, John Pettersson, Mal-

mö, och A. Östling, Norrköping. Av dessa avsåde sig dock senare herr Tell sitt uppdrag och i hans ställe kom hr Otto Roesel, Borås.

Den ävenledes bordlagda frågan om utdelande av premier eller utmärkelsetecken till personer som visat en viss grad av skicklighet i Esperanto och den därmed sammanhangande frågan om examina i språket hänsköts till verkställande utskottet för utredning.

Nästa punkt på dagordningen var frågan om S. E. F:s anslutande till U. E. A. Efter ett anförande av hr Tell till förmån för U. E. A. beslöts att förbundet skulle liksom föregående år ansluta sig till detsamma.

Ett förslag om upprättandet av ett s. k. vandringsbibliotek, som skulle kunna rekvireras av lokalföreningarna, antogs. Detta bibliotek skulle huvudsakligen bestå av propaganda- och upplysningslitteratur angående Esperanto samt övningslitteratur. De förberedande arbetena härför skulle göras av den förut valda »centralkommittén».

Från Gävle Esperantoförening förelåg ett förslag om utgivande av en propagandabroschyr om Esperanto för att avhjälpa den brist på all upplysningslitteratur som förefinnes. Redan vid föregående årsmöte beslöts att utge en ny svensk upplaga av de s. k. Esperantoncyklarerna. På grund av kriget har det emellertid visat sig omöjligt att erhålla stereotypplattorna till densamma från England, som förbundet erhållit löfte om. En dylik broschyr vore därför synnerligen behöflig och beslöt mötet att förbundet snarast skall utge en sådan. I sammanhang härmed beslöts att utge ett flygblad, »hela Esperanto på ett blad», liknande de som finnas på andra språk och uppdrogs åt »centralkommittén» att utarbeta förslag härtill.

I en till mötet ställd skrivelse hade hr J. Helsing, Gävle, närmast med anledning av det öde hr Lindhagens i riksdagen framlagda motion i världsspraksfrågan rönt, föreslagit, att förbundet måtte tillsätta en kommitté för uppvaktande av riksdagens ledamöter, ävensom som tidningsmän, för att hos dem framhålla Esperantos betydelse. I den av skrivelsen föranledda diskussionen påpekade hr Tell m. fl. svårigheten att realisera några av förbundet fattade beslut i denna riktning, utan borde härvid det privata initiativet få vara bestämmande. Ävenså ifrågasattes lämpligheten av att på det-

ta sätt driva fram saken vid riksdagen, så länge det stora flertalet, folket, för vilket riksdagen ju endast är en representation, vore i relativ okunnighet om världsspraksiden. Ett intensivare upplysningsarbete för saken bland allmänheten är första villkoret för framgång. Mötet beslöt att bordlägga förslaget om tillsättande av en kommitté för ändamålet, men att i stället uttrycka såsom sin önskan att privata esperantister göra vad de kunna i den angivna riktningen. Vidare beslöts att giva centralkommittén i uppdrag, att enligt vad hr Helsing i samma skrivelse föreslagit, arbeta för att Esperanto upptages såsom föreläsningssämne vid föreläsningssamfundningar och arbetsinstitut.

Till styrelsen hänsköts för utredning ett förslag om att S. E. F. skulle efter mönster av U. E. A. utse ombud på skilda platser inom landet, som skulle tillvarata förbundets intressen.

Utgivandet av en adressbok över svenska esperantister var även föremål för behandling och beslöts att så snart möjlighet funnes utge en dylik.

Härefter avslötos förhandlingarna för dagen. De återupptogs vid söndagens möte, som tog sin början kl. 2 midd. och inleddes med en av ordföranden lämnad resumé över lördagens förhandlingar, varefter man övergick till dagens ärenden, som huvudsakligen omfattade val av styrelse och revisorer m. m.

Ansvarsfrihet beviljades styrelsen för det gångna verksamhetsåret, dock med undantag för räkenskaperna, då någon kassarapport och revisionsberättelse ej hunnits utarbetas.

Härefter förrättades de olika valen.

Till förbundsordförande återvaldes enhälligt trafikcheffsassistenten hr J. Lundgren, Hedemora.

Till medlemmar i verkställande utskottet, som fortfarande skulle ha sitt säte i Gävle, återvaldes samtliga de förutvarande: v. ordf. hr W. Wahlund, sekr. hr R. Pehrsson och kassör hr J. Helsing.

Till övriga styrelsemedlemmar valdes, medelst sluten omröstning, fröken Helmi Josefsson, Stockholm, hrr John Johansson, Stockholm, Leander Tell, Norrköping, Carl Onlsson, Göteborg, Paul Nylén, Stockholm, John Pettersson, Malmö, Carl Winberg, Bengtsfors, och E. Beckman, Gävle. Av dessa avsåde sig emellertid hr Tell, Norrköping,



## Esperanto i Sverige.

*Borås.* — Om rörelsen därstädes skriver föreningens ordförande till »La Espero»:

»En mängd omständigheter synas ha förenat sig för att minska vårt medlemsantal. Även döden har kommit i sin tur. Efter ett långt lidande har vår meningsfrände och föreningsmedlem Eugen Berger avlidit på sjukhuset här. Hans stora och djupa intresse för vårt språk, som han ivrigt studerade, hans goda och öppna karaktär, hade förskaffat honom många vänner. Allt för tidigt måste han gå bort ur livet och vi beklaga förlusten av en mycket trofast medlem. —

Mötena äro fortfarande otillräckligt besökta. Kursen, i vilken denna gång ej många personer deltagit, är avslutad. Under sommaren komma regelbundna sammanträden ej att hållas. Men för de intresserade anordnas ofta promenader och möten i kafé-trädgårdar för muntlig övning i vårt språk. Vi skola också bereda oss på att med nya krafter taga itu med arbetet för Esperanto igen, när sommardagarna höra till det förflutna. —

O. R.

*Gävle.* — Det gångna halvåret synes för Gävle Esperantoförening ha varit en tid av återupptagen livlighet. Den sista kursen, i vilken ett tjugutal personer deltog, förskaffade föreningen en del nya intresserade medlemmar. Efter kursens avslutande försiggår studiearbetet i form av »studiecirklar», bestående av 5—6 medlemmar, som under ledning av en skickligare esperantist regelbundet sammankommer för att läsa och tala språket. Fyra sådana grupper ha redan bildats. — Flera fester och utflykter ha ägt rum under våren, varje söndag göres vanligen en promenad i stadens omgivningar, i vilka fler och fler intresserade medlemmar deltagit. Och i kafé »Esperanto», som innehaves av en ivrig esperantist, ha vi fått en utmärkt mötesplats, som samtidigt är en god propaganda för vårt språk.

Föreningen planerar anordnande av en utfärd till Uppsala under sommaren, troligen första söndagen i augusti. Samtidigt skulle anordnas en utflykt dit från Stockholm, och man skulle tillbringa söndagen gemensamt. Esperantister på andra platser, som eventuellt önska deltaga, ombedjas tillskriva hr R. Pehrsson, 3—23, Gävle.

*Norrköping.* — Norrköpings Esperantoförening »La Esperanta Stelo» hade sitt sista sammanträde för denna säsong tisdagen den 15 juni, då det beslöts att återupptaga arbetet inst. augusti eller september månad. Under ordförandens bortresa, blir hr A. Östling ledare.

## Esperanto en Svedujo.

*Borås.* — Pri la movado en tiu urbo la prezidanto de la klubo skribas al »La Espero»:

»Multaj cirkonstancoj ŝajnas kuniĝintaj por plimalgrandigi nian anaron. Eĉ la morto eniĝis en la vicon. Post longa suferado mortis en la hospitalo tie ĉi nia samideano kaj membro de nia klubo, s-ro Eugen Berger. Lia granda kaj profunda intereso por nia lingvo, kiun li fervore studadis, lia bona kaj sincera karaktero havigis al li multajn amikojn. Tro frue li devis foriri el la vivo kaj ni priplendas la perdon de tre fidela ano. —

La kunvenoj estas daŭrige ne sufiĉe vizitataj. La kurso, en kiu ĉi-tiun fojon ne multaj personoj partoprenis, estas finita. Dum la somero regulaj kunvenoj ne okazos. Sed por interesuloj estos ofte aranĝataj malgrandaj promenadoj kaj kunvenoj en ĝardenoj de kafejoj por parola ekzercado en nia lingvo. Ni ankaŭ preparos nin por novforte reokupi nin je nia laboro por esperanto, kiam la someraj tagoj apartenas al la pasinteco. —

O. R.

*Gävle.* — La pasinta duonjaro ŝajne estis por la klubo esp. de Gävle tempo de revigliĝo. La lasta kurso, en kiu partoprenis dudeko da personoj, havigis al la klubo kelkajn novajn interesatajn membrojn. Post la fino de la kurso la studado de la lingvo okazas en formo de »studecirkloj», konsistantaj el 5—6 membroj, kiuj sub la gvidado de pli lerta esperantisto kunvenas regule por legi kaj paroli la lingvon. Kvar tiaj grupoj jam fondiĝis. — Pluraj festoj kaj ekskursoj okazis dum la printempo, ĉiudimanche estas ordinare promenado en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo, en kiuj pli kaj pli granda nombro de interesataj membroj partoprenis. Kaj en la kafejo »Esperanto» posedata de fervora samideano, ni ekhavis bonegan renkontejon, kiu samtempe estas bona propagando por nia lingvo.

La klubo projektas aranĝon de ekskurso al Upsala, dum la somero, kredeble la unuan dinamcon en aŭgusto. Samtempe estus aranĝata ekskurso tien de Stockholm kaj oni pasigus la dinamcon kune. Samideanoj en aliaj lokoj, kiuj eventuale deziras partopreni, estas petataj skribi al s-ro R. Pehrsson 3—23, Gävle.

*Norrköping.* — La Klubo Esp. de Norrköping »La Esperanta Stelo» havis sian lastan kunvenon de tiu ĉi sezono mardon la 15 de junio, kiam estis decidata rekomenci la laboron en la venonta monato aŭgusto aŭ septembro. Dum la forvojaĝo de la prezidanto s-ro A. Östling estos la estro.

av principiella skäl sitt uppdrag, varför i hans ställa inryckte hr Otto Roesel, Borås, som kom närmast i röstetal.

Till revisorer utsågos hr Anton Östling och fröken Eva Tibbling, Norrköping.

Angående nästa årsmöte, så utta-

lade mötet såsom sin önskan att det skulle förläggas till Borås, så som var föreslagit för årets möte men ändrats. Härefter avslöts förhandlingarna sedan mötet pågått i ej mindre än fem timmar.

Som synes, ha många och viktiga frågor varit föremål för årsmötets

förhandlingar. Det är också att hoppas att förbundet, som ju hittills endast varit i sin linda, under det kommande året skall växa sig större och starkare både utåt och inåt, och föra vår sak ännu ett steg framåt mot målet, som träder allt närmare.

Rpn.



## La nova pacagado.

Resumo de artikolserio de R. Moe, la sekretario de la Norvega Nobel-a pakkomitato, Kristiania.

### De Brynjulf Jhss. Klingenberg

#### I.

Oni ne havas tiun sperton, ke militoj fundamentigus stabilan ordigon de la justeco aŭ paĉtato.

La paco de la milita lacegeco certe ofte okazigis longdaŭrajn pacperiodojn. Sed ne estas pri tiu speco de paco, ke oni revis, kiam oni esperis konstrui la estontecon sur la paco. Mirakle estus, se la venkintoj rezignus la tutan rekompencon por siaj militaj elspezoj kaj kune kun la venkitoj en neprofito fratameco realigus la idealojn de la paclaboro. La Viena kongreso en 1815 estis do grandega seniluziigo.

Mirinde estas, ke nun en la tempo de danĝeriga krizo oni forkuras de la origina pactasko, nome: modere provi la restoracion de la organizo apartenanta al la pacmovado kaj anstataŭe agitadas en la malgrandaj, neŭtralaj landoj por fantazia kaj sentimentala programo, kies postulojn oni en kristana naiveco petas esti realigitaj ĉe la politikistoj de la venonta kongreso.

Ĉu oni pripensas, ke tin kongreso naturdevece estas aranĝota en la signo de la nacia realpolitiko?

La iniciativo por tiu nova pacagado estas origine donita per la anglaj politikistoj S-ro I. Ramsey Macdonald, estro de laboristoj kaj S-ro Charles P. Trevelyan, ministro de instruado, — plie S-ro Normann Angell, S-ro E. D. Morell kaj fine A. Ponsonley, — kiuj elrompis kontraŭ ministro Grey kaj eldonis la 17-an de Septembro 1915 manifeston kun la titolo:

»La kondiĉoj por stabila paco.»

Tiuj ĉi formis kvar artikolojn:

1. Nenian cedon de iu provinco krom plebiscito.\*)
2. Demokratian kontrolon de fremdlanda politiko.
3. Nenian estontan politikon por alianco kaj egalpezo, sed aranĝon de Eŭropa koncorto.\*\*)
4. Anglujo proponas enprenota en la pakondiĉojn laŭregulan, grandan malplimultigon de la armigoj kaj fabrikoj de la armiloj.

\*) internacia vorto signifanta: popola voĉdonado.

\*\*\*) politika kunlaborado dum paco.

Samtempe la nomitaj sinjoroj fondis la societon »The union of democratic control». Politika neklareco kaj sentimentaleco de izolitaj politikistoj estas ĉie la fakto kaj el la starpunkto de iliaj naciaj samlandanoj tiu fakto estas dorsatako kontraŭ la ministraro. Ankaŭ la dua punkto estas tute angla, partia politiko. Sur la sama manifesto estis la 8-an de Oktobro fondata la holanda »Anti-Oorlog-Raad» kun tre aliformigita programo. Oni legu broŝuron pri tiu, eldonitan de Ĝeneralsekretario Chr. L. Lauge »La Eŭropa burĝa milito». La diversaj programoj parte entenas postulojn, kiujn oni pretendas realigitaj per la venonta kongreso de la nun batalantaj ŝtatoj, — parte postulojn, kiuj koncernos la venontajn taskojn por la internacia pacagado.

Tiuj programoj tute ne havu punktojn, al kiuj estas donotaj interpolitikaj karaktero. Per tio oni timigos la burĝajn politikajn partiojn en la grandaj, militantaj ŝtatoj. Ankaŭ la programoj tute ne invitu la neŭtralajn ŝtatojn ke ili donu nemenditajn konsilojn. La konsekvencoj de tio ĉi eble estus plej malbonaj por la naciaj intereso de la konsildoninta ŝtato.

En ambaŭ gravaj programpostuloj oni havas pruvon pri tiu fakto, ke la maljunaj kondukantoj de la pacagado ne estas lernintaj ion ajn de la milito, kaj la sopiro, ke la pacmovado pliboniĝu, estas vanigita. Mi unue traktos la valoron pri la »karbista kredo» de la pacemuloj al la supozata pacspirito de la venonta packongreso.

La alvoko de »Anti-Oorlog-Raad» supozas, ke la pacigo post la nuna milito estus komuna, deĉiuj partioj kaj venkitoj aranĝita laboro, enkiu la venkintoj, — militintaj kaj neŭtralaj, — egalmeze antaŭenhelpos la oficialan bonstaton de la estontaj gentoj. Estas tute nur naiveco! La internacia ĝeneralsekretario Chr. L. Lauge diras, ke post la milito oni havus idealan ordigon de la justeco, se oni nur forigus el la paciga laboro »la eluzitajn kaj tromaldormintajn politikistojn», kiuj estas kondukintaj la mondon en militon.

Ĉu estas la neŭtrala Skandinavujo, kiu prenos la iniciativon de tia forigado?

Ĉu tiu mendo en la programo vere estus sukcesa?

Aŭ eble, — Ĉu la dormemaj sinjoroj povas esti supozataj, ke ili rezignos sian regadon kaj iras por ripozi? Tiam ilia ronkego certe re-

sonos super moralan kaj eterne paceman Eŭropon!

Multaj homoj vagas en la neŭtralaj landoj, portantaj tute malkorektajn opiniojn pri la nuna milito. Tiu estas »sensenca», — la grandaj, militantaj ŝtatoj reprezentas la malpravecon, la senmoralecon kaj haoson!

Sed la neŭtralaj ŝtatoj kompreneble enhavas la pravecon, kaj ĉiajn politike decajn valorojn! Kaj speciale la malgrandaj, nordaj ŝtatoj estas tutnature kiel ĉiam la »Grundtviga»\*), eminenta Korpopolo!

Ni repravigos ilin, — ni lernigos al ili la morojn! Estus ĝusta amago, se ni kun nia politika moralo kaj nia filistra rezonado en nia dorsoŝto tute neinvitite nin prezentus al la milita packongreso por edifi la plej grandajn kondukantajn kulturpopolojn per nia memoficdonita juĝmieno pri la mondfaktoj.

Estus senvalidigi la mondhistoriajn problemojn liberigitajn per la katastrofo de 1914, se oni traktus ilin nur sub la perspektivoj de la moraleco aŭ prudenteco; — kaj oni senvalidigus tiamaniere la komplikitan kaj malfacilegan naturon de la pacproblemoj.

Estis tiuj problemoj, kiuj estis pli fortaj ol la respondaj politikistoj kaj diplomatoj.

Ni (la nordaj neŭtralaj ŝtatoj) apenaŭ havas rajton meti nin mem kiel juĝistojn por ilia batalo. Ni ankaŭ ne havas rajton postuli per ili la finigon de la milito tute nekonserante aranĝota laŭ elpensita morala ordigo de justeco preterlasonta tute la naciajn interesojn de la popoloj. La militantoj povas ĉie respondi al la pacemuloj: »Ne, trovu la elpensitan moralan ordigon dum la daŭrigota paclaboro. Estas seneble havi vin mem kiel donacon de politikistoj kaj soldatoj.

Kaj cetere, se ni kongrese en dezirata maniero establu plene politikan, teritorian kaj ekonomian ordigon de la justeco, tiam estus necese antaŭmeti teritoriajn demandojn koncernantajn vin mem.»

Estu lasataj solaj la sinjoroj en la militanta Eŭropo por frakasi siajn ĉerizkernojn.

\*) Grundtvig estis fama episkopo en Danujo.

(Forts.)





## Preĝo.

De Rabindranath Tagore.

Tio estas al vi mia preĝo, Sinjoro,  
— batu, kaj trafu la radikojn de l'  
manko en mia koro.

Donu al mi la forton porti facile  
miajn ĝojojn kaj zorgojn. Donu  
al mi la forton fari fruktodona  
mian amon en servo.

Donu al mi forton nek malatentiam  
la malriĉulojn, nek fleksi miajn  
genuojn antaŭ aroga potenco.

Donu al mi forton levi mian  
spiriton super ĉiutagajn bagatelojn.

Kaj donu al mi forton fordoni  
mian forton al via volo en amo.

Trad. de Walter Lippman, Leipzig.  
El »La Holanda Pioniro»



## La VII dana jarkunveno en Odense.

### Programo.

*Sabato la 10an de Julio*

*Je la 8a horo* vespere la kunveno  
estos malfermata je festeto en  
»Odense Esperantoforeing», kies  
kunvenejo estos »Fyens Forsam-  
lingshus».

*Dimanĉon la 11an de Julio:*

*Je la 10a horo* okazos ĝeneral-  
kunveno de »Centra».

*Je la 1a horo* prezentado de la  
urbo kaj per aŭtomobilo, vaporboato  
aŭ tramo vizito en la fagarbareto  
»Fruens Bøge», proksime de Odense.  
La biletoj ĝis tie kostas malmultajn  
oerojn.

*Je la 7a horo* estos aranĝata por  
la samideanoj, kiuj deziras partopreni,  
komuna manĝado: Fiŝo, rostajo  
kaj deserto, je la prezo 2,50 Kr.  
sen trinkaĵoj.

*Je la 9a* okazos amika kunesto,  
kiun espereble ĉeestos ĉiuj partoprenantoj  
de la jarkunveno, tiu-ĉi kunveno  
finiĝos je adiaŭa glaso, kiu  
ne estas speciale pagota.

Karto por la kunveno kostas 1  
Kr. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ  
mendi kartojn por la jarkunveno  
kaj por la komuna manĝo ĉe Dro. v.  
Leunbach, Nørrebrogade 104 Kbhvn.  
N., aŭ ĉe Sro. Alved, Aalykkegaads  
Allé, Odense. Sro. Alved ankaŭ  
petas de vi informon, je kiu horo  
vi alvenos al Odense, por ke sa-  
mideanoj vin povu akcepti je la

stacidomo. Rilate al antaŭmendoj  
de ĉambroj (1, 50 à 2 Kr.) en la  
hotelo Fyens »Forsamlingshus» ni  
petas vin adresi al Sro. Alved.  
Ĉiuj kunvenoj kaj festoj endomaj  
okazos en la hotelo.

La 10an kaj 11an de Julio, en  
la mezo de la bela dana somero,  
okazos la jarkunveno en la ĉefurbo  
de la »ĝardeno de Danujo».

Ni vivas en granda kaj interesa  
tempo, kiu malgraŭ ĉiuj teruajoj  
donas por estonteco, sefinajn pro-  
mesojn. Ni esperantistoj, kiuj  
laboras por la estonteco atendas  
kun speciala atento la okazintaĵojn  
de la mondo kaj nun pli ol ordinare  
deziras povi interŝangi vortojn kaj  
pensojn kun homoj, kies interesoj  
transiras la ĉiutagajn banalaĵojn.

Tial, samideanoj, venu multnom-  
bre al la jarkunveno, por ke ni povu  
interparoli pri la stato de nia afero  
dum kaj post la milito. Ni esperas,  
ke ankaŭ eksterlandanoj samideanaj  
gastu nian neŭtralan insularon kaj  
tiamaniere donu al nia kunveno la  
internacian koloron.



## N. E. L.

*Larvik.* Laŭ invito de l' Unuiĝo  
de Larvik-aj ĝeinstruistoj fino J.  
Finholt faris propagandan parol-  
adon en ilia kunvenejo vendredon  
la 14-an de majo. Poste oni aran-  
ĝis agrablan festenon. Multaj ĝein-  
struistoj aliĝis al estonta kurso.



## Alvoko.

### Esperantistoj! Pacifistoj!

Karaj samideanoj!

Vi scias ĉiuj, kiel nune la plej  
freneza milito regas en nia mond-  
parto. Vi scias ankaŭ, ke la popolo  
en ĉiuj landoj deziras kaj vokas  
pacon. Vi scias ankaŭ, ke estas  
malfacile antaŭdiri la rezulton  
de tiu ĉi milito. Unu afero estas  
tamen certa kaj tiu estas — ke la  
ŝtatoj post tiu ĉi milito, aŭ komen-  
cos armiĝi pli terure ol ĝis nun aŭ  
ke ili devas subskribi deklaron, kiu  
postulas, ke ili dum difinita  
tempo malarmiĝos.

Nun, se iam, estas la devo de ni  
pacifistoj kaj unue de la esperant-

istaj pacifistoj en ĉiuj landoj unu-  
iĝi en forta asocio, por almenaŭ  
iom helpi en la paca laboro post la  
milito. Post la milito estas la ĉefa  
afero ke la nun militantaj popoloj  
rekomencu siajn internaciajn rilatojn  
kiel antaŭe kaj ne rigardu unu la  
alian kiel malamikojn. Nia kulturo  
postulas tion, se ĝi ne ruiniĝu. Sed  
certe la lingva demando estos mal-  
facile solvita. Ĝar mi kredas, ke  
post tiel granda furiozeco inter la po-  
poloj kiel nun, estos tre malfacile por  
la germano en siaj internaciaj ko-  
mercoj k. t. p. uzi la francan aŭ la  
anglan lingvon, same kiel por la  
franco kaj la anglo uzi la germa-  
nan, tial estas por ili plej bone se  
ili povas interkonsenti pri uzado de  
helpingvo. La plej bonaj ŝancoj  
por Esperanto tial montros sin post  
la milito, sed por esti certaj je venko,  
ni esperantistoj devas komenci tuj  
laboregi por veni al la dezirita celo.  
La disvastigado de esperanto inter  
ĉiulandaj pacifistoj estus granda  
paŝo. Kaj tion ni plej facile farus  
per eldonado de internacia paco-  
revuo, presita en esperanto, kaj per  
fondado de internacia esperanta  
paco-federacio, en kiu ĉiuj pacifistoj  
estos kunigitaj por povi komune  
labori.

Nun mi petas ĉiujn samideanojn,  
ke ili tiel baldaŭ kiel eble sciigos  
al subskribinto sian opinion pri  
fondo de tia federacio. Ĉiuj per-  
sonoj, kiuj volas kune kun mi  
organizi ĝin komuniku al mi pri  
tio kaj ĉiuj personoj, kiuj deziras  
esti membroj en la federacio skribu  
pri tio.

Se la rezulto de tiu ĉi alvoko  
estos bona, mi intencas baldaŭ el-  
doni pacorevuon, en kiu mi klarigos  
la rezulton kaj la proponojn kiuj  
alvenis al mi, k. t. p. Por iamani-  
ere helpi en la ekonomiaj aferoj en  
tiu ĉi entrepreno, mi petas ilin, kiuj  
estas interesataj por la afero kaj  
povas, ke ili sendu al mi monsu-  
meton de ekz. duonan spesmilon,  
por kiu ili poste ricevas la gazeton  
alsendota.

La ĉefa afero tamen estas, ke vi  
sciigos al mi viaj opinioj pri la en-  
trepreno kaj ankaŭ proponoj por  
ĝia realigado.

Ĉiuj pacemaj esperantojurnaloj  
estas petataj enpresiti tiun ĉi alvokon,  
kaj sendi numeron de la gazeto  
al mi.

Kun antaŭdanko kaj espero pri  
bona kunlaborado mi restas via

Einar Adamson,  
Brynäs gat. 30,  
Gefle, Svedujo.



## Libroj kaj gazetoj.

### Libroj ricevitaj:

De Moskva Librejo Esperanto, Lubjanskij projezd, 3. Moskvo, Ruslando:

„La Reĝo Judea” dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj de K. R. tradukita el la rusa lingvo de J. V. Devjatnin. Prezo 1 Sm.

„Salajro,” Rakonto de N. Timskovskij, trad. el la rusa lingvo de T. Ŝčavinskij. Prezo 0: 20 Sm.

„Konvenaĵoj”, komedieto de Bilibin, trad. el la rusa lingvo de M. Aleksandrov. Prezo 0: 10 Sm.

De »Civitanoj de l'Mondo» Tomna-Monchan, *Pitlochry*, Skotlando:

Broŝuro pri la celo kaj karaktero de la nova pacligo fondita sub la nomo de »Civitanoj de l'Mondo». Ricevebla senpage.

Recenzoj sekvas.

**La vort-teorio en Esperanto** verkita de René de Saussure (Antido). Dediĉita al D-ro Zamenhof kaj al la Akademio Esperantista okaze de la Deka Kongreso en Parizo 1914. Universala Esperantia Librejo. Genève. 1914. 80 p. Prezo: 0,800 Sm.

*Enhavo:* Antaŭparolo. Ĉap. 1-a: Vort-analizo (»La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj», Fund. Gram. reg. 2-a). Ĉap. 2-a. Vort-inteco. Ĉap. 3-a; Meĥanika metodo por sintezi kaj analizi vortojn. Ĉap. 4-a. Respondo al kritikoj (Ĉefeĉ kaj Panel). Aldonaj rimarkoj.

Akompanas la libron enmetita »Deklaro» (datita Bern, majon 1914) laŭ kiu la aŭtoro per sia ampleksa teoria agado tute simple celas »montri ankaŭ science la superecon de Esperanto» (rilate al Ido). La verkaĵo, plejparte konsiderinda kiel reviziita, eble ankaŭ mallongigita eldono de la disertacio de »Antido» en Internacia Scienca Revuo 1910—11 pri »La logika bazo de vortfarado en Esperanto» (principo de neceso kaj principo de sufiĉo), estas tre leginda, sed ne facile legata, dum ĉiu paĝo malkaŝas alloge la lertan, severe logikan scienciston.

H. B.

**Kongreso de Homaranoj**, en Bern 12—14 aŭg. 1914. Centra Oficejo de la gazeto Homaro, Lausanne, Svislando. (12 paĝoj.)

Tiu kongreso neniam okazis ankaŭ

pro la anakronisma milito, sed se tia kongreso okazis kelkajn jarojn pli frue eble la milito neniam okazus. Ĉar estas kurioza afero: ĝuste kiam naskiĝis la granda afero kies celo estas malebligi la militon, la milito ekkomencis kaj eksurprizis la forte kreskantan germon. »Homaranismo» estas esperanta vorto, nome la ismo aŭ movado kiu kolektas la anojn de l' homaro t. e. anojn kiuj volas rigardi la homaron nur kiel aron da egalrajtaj homoj kiujn oni devas ami nur pro tio ke ili estas homoj, anoj de l' sama homaro kiel oni mem, loĝantoj de la sama terglobo kiel oni mem, kia ajn estas ilia okaza deveno, lingvo, religio aŭ socia rolo. Estas d-ro Zamenhof kiu tre nature pro siaj grandaj laboroj por internacia interkompreniĝo kaj fratiĝo eljetis tiun ĉi duan grandan ideon de l' fratiĝo de la homaro. Mi diras »duan» ideon, ĉar oni ne intermiksi tiun ideon kun la Esperantoideo, kiu ekzkluzive celas la alprenon de internacia neŭtrala helplingvo; kaj por eviti tian intermikson precipe flanke de la malamikoj de la Esperanto-movado li dum la oka kongreso rezignis la estrecon de la Esperanto-movado por povi oficiale estri tiun novan »religian» sistemon de li kreitan. Sed kvankam esperantisto tute ne bezonas aliĝi al tiu ĉi ideo, la tiel nomita interna ideo de la Esperantismo en gravaj punktoj identiĝas kun la principoj de la Homaranismo, kaj la ĉefa celo estas certigi la eternan pacon inter la popoloj. Tial ĉiuj homoj kiuj vidas kiel sian idealon la antaŭenkreskadon de internacia homa kulturo sur tute neŭtralaj fundamentoj (ankaŭ kaj unue en lingva rilato) kaj sur pacigita kaj unuiginta terglobo kiu sin ĉiam evoluadas kaj malgrandigas — tiuj antaŭ ĉio estas homoj en bona signifo kiuj amas siajn kunvivulojn kie ajn ili estas naskitaj sur nia jam nun tre malgranda tero — kaj ne antaŭ ĉio germano, aŭstro, hungaro, turko k. t. p. kiuj sole deziras mortigi anojn de aliaj popoloj nur pro tio ke ili ne estas naskitaj en ilia lando.

Ne, malgraŭ la milito, ni nun ne vivas en la mezepoko, kaj nun ni devas kompreni ke la sama malgranda tero do produktis kaj eknutris nin ĉiujn! Kiuj komprenas tion, ili devas aliĝi al la homaranisma afero!

La libro »Kongreso de Homaranoj» estas eldonita de la organiza komitato de tiu ĉi kongreso kaj

entenas la programon de la aferoj pritraktotaj dum la kongreso kaj la »Deklaracion pri Homaranismo» en 10 paragrafoj.

Oni ankaŭ eldonis gazeton en Esp. nomitan »Homaro», kies centra oficejo estis ĉe A. Thomrey, 20 chemin de Malley, Lausanne, Svisujo, kaj kies redaktoro estis s-ro d-ro Fr. Uhlmann, kaj tiu ĉi gazeto publikas la nomojn de aliĝantoj de la Homaranismo.

Ni ankaŭ ricevis germanlingvan (kial ne esperante presitan?) aliĝilon por aliĝo al la ĉefaj principoj de la Homaranismo, plie germanlingvan broŝuron 8 paĝan »Der Homaranismus» kiu entenas la »Deklaracion» germanlingve kaj la klarigojn kaj de d-ro Zamenhof kaj de l' redaktoro de l' »Homaro».

*Noto.* — La recenzon »La Monnaie Internationale» en n-ro 5 de »La Espero» verkis s-ro Rolf Paulsen.

## En underlig resa.

En fantastisk dröm.

I går natt gjorde jag en underlig resa.

Under det jag sov mycket hårt, drömde jag, att min vän Francois gav mig sin flygmaskin, för att jag skulle få göra en färd till månen. Mycket nöjd för jag från jorden. Snart såg jag denna som en stor ost, som undan för undan blev allt mindre.

Efter en timmes färd kom jag till månen. Den var vackert belyst av jorden. Måninvånarna tycktes vara mycket lyckliga över mitt besök och de mottogo mig mycket hjärtligt. De voro glada över att jag talade esperanto, ty annars hade de icke kunnat få de uppgifter om vår jord, som de nu fingo. Vi samspråkade om ditt och datt och när de fingo veta, att vi här på jorden hade en sådan mängd språk, blevo de mycket förvånade och uttryckte som sin fasta övertygelse, att de ständiga striderna här på jorden voro förorsakade genom den ännu rådande språkförbistringen. Måninvånarne hade även förut varit skilda åt genom språken. De hade även de varit i strid med varandra. De hade esperanto att tacka för det vänskapsförhållande som nu rådde där.

Att de fått reda på esperanto och börjat lära det, var en ren slump. De hade på något sätt fått dit en



lärobok med fransk-esperantisk ordlista. De kunde icke själva förklara huru, men de misstänkte, att det var någon av esperantisterna bland de franska flygarna, som tappat den och att den på något mystiskt sätt kommit in i deras atmosfär. Nåväl, genom denna lilla lärobok började de dock förstå vad nytta ett dylikt språk skulle medföra. Icke långt därefter fanns denna bok utgiven på respektive månspråk. Många vetenskapsmän togo genast hand om saken och med ledning av denna lilla bok utarbetade de så småningom fullständiga ordböcker.

I läroboken hade de även funnit namnet på esperantos upphovsman d:r Zamenhof och de blevo därför mycket glada då jag medförde alla hittills utkomna nummer av »La Espero» och då de i dem funno Zamenhofs porträtt samt esperantohymnen, till vilken de genast komponerade egen melodi.

Måninvánarnes riksorgan »Familia Rondo» (»Familjekretsen») utgavs på esperanto och tillställdes alla gratis. Folket på månen var mycket gemytligt, deras barn voro artiga och posttjänstemännen tillmötesgående. I kultur stodo de högre än oss, med esperanto hade krigskulturen försvunnit. De voro mycket intresserade för vår jord och hade därför försökt på något sätt komma i förbindelse med oss, men utan resultat.

De omtalade att jag var den tredje människan från denna jord som besökt dem. Förut hade de träffat Cyrano de Bergerac och Jules Verne, men hade de icke kunnat er hålla några upplysningar genom dem, då de hade haft svårt att förstå varandra. Det var då för dem en stor överraskning, att jag talade esperanto, och kanske ännu mer förvånade det mig att invånarna på denna avlägsna himlakropp talade esperanto och det på ett utmärkt sätt.

Senare gjorde jag tillsammans med mina nyförvärvade vänner en promenad på månen. En liten mångrabb gjorde därunder den anmärkningen att min näsa var mindre än Cyranos näsa. Jag svarade att Cyranos näsa var märkvärdig och att man på jorden icke längre göra liknande näsor.

Vädret på månen var alltid medelvarmt, bostäderna stora med breda fönster genom vilka en stor flod av ljus strömmade. När en måninvärnare ville göra någonting omöjligt, sade man alltid till honom: »Du vill fånga jorden med dina tänder».

Hans höghet månkungen önskade se mig. Efter ett vackert föredrag överlämnade han till mig, kvartmånens orden; jag tackade honom hjärtligt och sedan jag lovat framföra måninvánarnes hälsning till doktor Zamenhof och alla esperantister samt lovat att återkomma, reste jag därifrån.

Vetenskapsmännen ha påstått att mellan jorden och månen finnes icke luft. Det är ju ett löjligt påstående! Om det icke finnes luft så skulle jag icke kunnat andas och följaktligen skulle jag då varit död; och ni ser; att jag i oskadat skick är återkommen och vill därför framföra de hjärtligaste hälsningar från våra meningsfränder på den avlägsna månen.

E. Adamson.



## Radikala kuracmetodo.

S-ro Hansen venas hejmen, demandas ĉu la tagmanĝo estas preta, kaj ekscias ke ĝi ne estas preta. »Kial, je haŭto kaj ostoj de l' diablo, ĝi ne estas preta?» — »Tial», respondis Mario, lia edzino, tute trankvile, »ke la ligno estis tiel kondamnite malseka ke ĝi ne volis ekbruli». — »Sed, Manĝo, kiel vi malfartas? Ĉu vi fariĝis freneza? aŭ ĉu vi estas ebria?» — »Nek tia nek ĉi tia» ŝi respondis kviete kaj daŭrigis la aranĝon de l' tablo. — — La bovajo ne fandiĝis kiel butero inter la dentoj: ĝi kontraŭstaris malesperige la maĉadon, kaj fine Hansen eksplodis jene: »Kial ĉi tiu malbenita viando estas tiom satane malmola?» Mario suprenrigardis trankvile kaj respondis: Kara Hansen, vi ja mem aĉetis ĝin ĉe la buĉisto. Vi eble malatentis ke li eltranĉis pecon el satane maljuna bovino kiu ricevis malbene malmulte da furaĝo dum la lastaj du-tri monatoj» — Ekkoleriĝis Hansen, rigardis malkontente sian edzinon kaj deziris scii kion ŝi intencas uzante tian parolmanieron. Mi tute simple celas la jenon, Hansen: vi estas la familiestro, kaj kiam ŝajnas al vi esti vira konduto juraĉi en mia ĉeesto, tiam mi intencas fari la samon. Se ne plaĉas al vi aŭdi tion, vi nun scias kiamaniere vi povos malhelpi ĝin.» — Tiu kuracmetodo estis radikala, kaj ĝis hodiaŭa tago Mario ne bezonis uzi novan dozon de sia kuracilo.

Laŭ norvega ĵurnalo trad. H. B.

## Enigmoj

tradukitaj de N. H. Midthus.

1.

Ĝi estas pli saĝa en la vosto ol la kamparano en la kapo.

2.

Ĝi kreskis en montaro kaj fluis sur la maro, forĝisto forĝis kaj virgulino ŝpinis, ne multaga la tempo ĝin igis antaŭ ol jam ĝi viron mortigis.

3.

Supren ĝi iras kaj malsupren de deklivo kun homfemuro en la faŭko.

4.

Estas ajo en muro de domo komparana: ju pli da gastoj alvenas, des pli ĝi iras.



## Korespondado.

Ruslando. — S-ro V. A. Gromov. Moskvo, Poljanka, 2 Kazaĉij per d. 11. deziras interŝanĝi postkartojn il., leterojn kaj poŝtmarkojn. Nepre respondos.



Gäule Esperantoförening

Ordinarie månadmöte avhålls tisdagen den 6 juli kl. 8 e. m. å kafé D' Angleterre. Efter mötet samkväm.

Konversationskurs, eller, om vädret tillåter, utflykt i stadens omgivningar, äger rum varje söndag kl. 1/2 11 f. m. Samling vid kafé Esperanto. Obs! För alla

Föreningens bibliotek är flyttat till kafé Esperanto. Böcker utlånas genom kaféinnehavaren, herr Holmstedt.



**HERRAR**  
EKIPERA SIG BÄST OCH  
FULLSTÄNDIGAST HOS  
**Axel Lidholm**  
Drottninggatan 30 -- GEFLE

**Kiam** vi bezonas  
viandon, mendu  
ĉe  
**FRANS A. OLSON**  
Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

**"LA ESPERO"**

Gamla årgångar av La Espero (år 1913 och 1914) finnas i ett begränsat antal och säljas till ett pris av 1 kr. pr st. Varje esperantoförening ävensom varje intresserad esperantist bör äga dessa.  
Lösa nummer av tidningen kunna för spridning i propagandasyfte erhållas gratis av intresserade.  
Tillskriv *La Esperos expedition, Gävle.*

**Josef Wikströms**  
Tobakshandel  
GEVALIAPALATSET - GEFLE

**Central- och Jernvägshotellen**  
GEFLE  
**REKOMMENDERAS!**

Glöm ej!  
**Café "Esperanto"**  
under sommarmånaderna.

**SKODON**  
Största sortiment hos  
**A. M. Zimmerman & Co**

**C. J. LINDH**  
BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR  
S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE  
Rekommenderar sig vid behov av  
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.  
RIKSTELEFON 16 97.

**ESPERANTISTER!**  
*Köp och drick den verkligt goda njutnings- och sällskapsdrycken*  
**ESPERANTO PUNÇO**  
Alkoholfri.  
REK. FRÅN ANTON ÖSTLING,  
Styrmansgatan 36, NORRKÖPING.



Prenumerera på NORRKÖPINGSS  
UNGDOMS-REPUBLICS tidning  
**ÖRNEN!**  
Kr. 1.50 pr år. Minst 12 nummer  
ärligen.  
Begär provnummer, som sändes mot  
10 öre.  
*LEANDER TELL, Norrköping.*

**Carl Larssons**  
FOTOGRAFIATELIER  
NYGATAN 34  
**Rekommenderas!**  
TELEFON 3 57

**La Espero**  
utgives av Gefle Esperantoförening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.  
Lösnummerpris 10 öre.  
Prenumerationspris Kr. 1: 20.  
Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, Gefle, dels genom återförsäljare eller på posten.  
Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!  
Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

**Wickmans Kappaffär**  
NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE  
Vid Rådhusplanaden.  
**Kappor o. Promenaddräkter** i stort uryal.  
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.  
RIKSTELEFON 1391.

Från **"La Esperos" Expedition, Gefle,**  
kan rekvideras:  
**Läroböcker:**  
Lärobok i Esperanto av  
G. H. Backman ..... 1: -- + porto 0: 10  
Lärobok i Esperanto av  
P. Nylén..... 1: -- + » 0: 12  
Lärobok i Esperanto av  
Carl Ohlsson ..... 0: 50 + » 0: 08  
(Alla med Esp.-svensk ordlista)  
Esperantospråklära av  
O. W. Hjærtstätt ... 0: 40 + porto 0: 08  
Esp.-svensk o. Svensk-  
esp ordbok av Hjærtstätt ..... 0: 60 + » 0: 08  
Svensk-esp. ordbok av  
E. L-son Finn ..... 1: 50 + » 0: 12  
Unua Legolibro av Dr.  
Kabe ..... 1: 60 + » 0: 12  
Nova Testamento (mjukt  
band ..... 2: 50 + » 0: 30  
Sveda Kantaro, kun melodioj ..... 0: 35 + » 0: 08  
Esperantista Kantaro... 0: 75 + » 0: 04  
Esperantostjarnor ..... 0: 75 + » 0: 10  
Esperantobordsflaggor 2: 40 + » 0: 30  
D:o (något enklare) 1: 75 + » 0: 30  
D:o (mindre)..... 0: 85 + » 0: 30  
Esperantoflagga ..... 0: 50 + » 0: 08  
D:o (miniatyr) 0: 15 + » 0: 04

**Gust. Holms Förstoringsanstalt**  
Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.  
Paras pligrändigöjja laŭ fotografajoj.  
Unuaklasa laboro. Petu prezaron!

**N. Lundgren**  
GEFLE - Interurba tel. 151  
**Kamentuboj por fabrikoj.**  
Pli ol 800 konstruitaj.  
Riparoj dum uzado.  
Fulmkonduktiloj estas muntataj.  
Propra brikejo en Upsala.  
Plej granda firmo por konstruo de  
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.  
Argenta medalo en Stockholm 1897  
» » » Gefle 1901  
» » » Norrköping 1906

Esperantopapeterikartong, 25 ark brevpapper + 25 kuvert, damf. 1: 50  
" d:o, d:o, herrformat 1: 65  
Esperantopienpenno, 30 öre st., 3: — kr. dussin (hårda eller lösa).  
Esperantoblyertspennor, 10 öre st., 1: — kr. duss. (hårda eller lösa).  
Allt franco.  
Beställes hos **W. Wahlund, Gefle.**

Prenumerera på »La Espero»!

**E. Liljemarks**  
Cigarr- och Tobakshandel  
S. Centralgatan 28 och S. Kungsgatan 26  
**rekommenderas!**  
Prima varor till billigaste priser.